# MONDCIVITANOJ

## TUTMONDA CIVILA STATO :

## 1a tutmonda institucio

# MONDCIVITANOJ

## TUTMONDA CIVILA STATO :
## 1-a tutmonda institucio

El la franca, esperantigis: Jacqueline Lépeix.
Eldonis: la broŝurservo de S.A.T.
Esperanto, FR 47470 BEAUVILLE
1994.

***En la sama serio:***

*Andrée GAYMARD-ROLLET, **Por Tutmonda Civitismo***
*La necesa civitana edukado (76 paĝoj)*

*Guy MARCHAND, **Unu aŭ Nul***
*La Mondo aŭ estos tutmondista, aŭ ne plu estos (120 paĝoj)*

***Kongreso de la Popoloj***
*Antaŭbildo de demokrate elektita tutmonda Asembleo de la Popoloj (126 paĝoj)*

**INTERNACIA REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ**
(Registre International des Citoyens du Monde)
66, Bd. Vincent Auriol
FR 75013 PARIS

**MONDCIVITANOJ** (CITOYENS DU MONDE)
15 Rue Victor Duruy, FR 75015 PARIS
Telefono: 45 31 29 99 - Telekopio: (1) 48 28 57 90

# TUTMONDA CIVILA STATO

fondita en 1949 per la kreado de la

**INTERNACIA REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ**

al kiu ĉiuj homoj sur la tero rajtas peti sian enskribon, aliĝante al jena sindevontigo, kiu donas la rajton akiri la karton de Mondcivitano.

# SINDEVONTIGO

"Konscia pri mia respondeco kaj rezoluta akiri la agnoskon de miaj rajtoj de membro de la monda komunumo, mi petas, konservante mian ŝtatanecon, esti registrita kiel mondcivitano."

# SIGNIFO DE LA KARTO

La legitim-karto de Mondcivitano publike agnoskas tutmondan civitanan devon de reciproka protektado, kies evidenta neceso rapide montriĝis de post la fino de la dua mondmilito.

La akiro de la legitim-karto de Mondcivitano estas unue morala rifuzado, same kiel ago de saĝeco, fronte al internacia sistemo, kiu fariĝis absurda, ĉar teknike kaduka. La suverenaj ŝtatoj montriĝis de post 1945 nekapablaj alfronti la problemojn, bezonojn kaj danĝerojn, kiuj fariĝas komunaj al la tuto de la homoj. Ili starigas la homgrupojn iujn kontraŭ la aliajn, premas ilin per impostoj por konservi la perarmilan pacon, servutigas la nacietojn al la naciegoj kaj detruas, nome de la ekonomiaj kaj moralaj mobilizadoj, la civilizajn liberojn kaj valorojn, pene akiritajn per plurjarcenta luktado. Ili kondukas la tutan homaron al la neantaŭvideblaj detruoj de la atoma kaj bakteria milito, kiujn sekvos la teknokrata subpremado fare de la venkinta stabo.

Sen iluzioj, sen neutila entuziasmo, la akiranto de tiu karto simple asertas, ke metita estas la problemo de tutmonda demokrata organizado, ke necesas ĝin studi kaj malkovri novajn vojojn kaj teknikojn por ĝin solvi.

Li scias, ke, eĉ se la laboro de la Mondcivitanoj ne decidige influas la tujajn eventojn, tamen necesas multigi, en ĉiuj landoj, la centrojn de esplorado, edukado kaj intervenado, kiuj eksperimentas novajn metodojn por certigi minimuman protektadon al ĉiu homo kaj al la homaro, per minimumaj tutmondaj leĝoj.

Tiu karto esence signifas, ke ĝia havanto agnoskas:

1) ke la mondo fariĝis unu per siaj teknikaj kaj ekonomiaj solidaroj, kaj ke venis la tempo ĝin organizi;

2) ke la vorto "Homaro" ĉesis esti abstrakto kaj espero, kaj signifas de post la fino de la dua mondmilito amason da homoj egale minacataj de la samaj danĝeroj, angorantaj pro la samaj timoj kaj animataj de la samaj esencaj bezonoj, fronte al serio de novaj problemoj;

3) ke nek la ŝtatoj nek la organizitaj klasoj povas sur siaj nunaj bazoj ekpreni la ŝarĝojn kaj certigi la defendon de la komunaj bezonoj de la homaro, ĉar ilia bazo mem puŝas ilin al la perforto, t.e. al la atoma milito;

4) ke nur TUTMONDA LEĜO, certigante al la individuoj kaj al la popoloj minimumajn tutmondajn liberojn kaj sekurojn, egale agnoskita kaj respektata de ĉiuj ŝtatoj, povas ĉesigi la reciprokajn timojn kaj la vetarmadon;

5) ke tutmondaj institucioj, kun strikte limigita kompetenteco celanta starigi ilojn por la tutmonda sekureco, nepre necesas por krei la fidon necesan por starigi Mondan Federacion;

6) ke tiuj institucioj devas esti demokrate fonditaj kaj kontrolataj proporcie al la nombro de la uzantoj, kaj proporcie al la loĝantaro de la diversaj landoj;

7) ke tiu demografia reprezentado, kiu estas la nura demokrata vojo por organizi la tutmondan komunumon kaj certigi la sendependecon de la nacietoj, devas unue esti certigata per elektoj al la konstitucianta Asembleo de la Popoloj, elektota laŭ la sistemo de po UNU delegito por ĉiu miliono da loĝantoj, kaj komisiota doni konstitucion al la mondo, t.e. starigi la unuajn tutmondajn instituciojn.

La havanto de tiu karto restas libera mem serĉi la kampon kaj la metodojn de la agado en la plej diversaj sferoj, por trovi la sintenon kaj la agojn, kiuj vivigu la novan respondecon en li vekitan.

Ĝin ricevante, li ne fariĝas MEMBRO de ORGANIZAĴO aŭ de MOVADO. Li simple fariĝas elektonto al la konstitucianta Asembleo de la Popoloj (kaj, tion atendante, al la Kongreso de la Popoloj, vidu la broŝuron "**Kongreso de la Popoloj**") kaj akceptas kiel laborbazon la tekstojn ĝis nun akceptitajn de la Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj (vidu la broŝurojn pri tiu temo).

# KIEL FUNKCIAS LA INTERNACIA REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ ?

Kiel indikas ĝia nomo, la Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj konsistas el la listo de ĉiuj registritaj mondcivitanoj.

Ĉiu Registrocentro nacia, regiona aŭ loka, reprezentas la Internacian Registrolibron, ĝi fontas el ĝi, kaj la listoj de la mondcivitanoj, kiujn registras ĉiuj centroj, kune formas la Internacian Registrolibron. Tiuj listoj estas ĉiujare kunigataj ĉe la Internacia Centro, kiu tiel posedas la kompletan registrolibron, kiu konstituas la nunan tutmondan civilan staton.

Tial la Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj neniel povas esti asimilata al movado.

Cetere, ĉar la Internacia Registrolibro estas malfermita por ĉiuj homoj sur la tero, ĝi ne povas subteni apartan politikan kaj ideologian doktrinon. Neniu ordono povas esti donata, sed ĉiu mondcivitano konscia pri sia respondeco agas tie, kie li troviĝas, laŭ la maniero, kiu ŝajnas al li la plej efika por realigi la celojn, kiuj estas proponataj al ĉiu persono, kiu petas sian enskribon en la Internacian Registrolibron, t.e. la organizado de la paco en la mondo, per la lukto kontraŭ la absoluta suvereneco de la naci-ŝtatoj.

La 27-an de julio 1949,

estis deponita ĉe la Polica Prefektejo de Parizo la statuto de Asocio nomata "tutmonda suverena Internacia Sekretariejo de la Mondcivitanoj".

Estis deklarite notinde, ke:

Artikolo 2 La celo de tiu asocio estas ebligi la organizadon de la monda paco, kaj por tio,

1 - kunigi ĉiujn homojn de ĉiuj landoj kiel mondcivitanojn,

2 - plejeble rapide aperigi tutmondajn civitanecon, suverenecon kaj instituciojn,

3 - prepari la tutmondajn elektojn por konstitucianta Asem-

bleo de la Popoloj surbaze de rekta kaj proporcia reprezentado per la sistemo de po unu delegito por ĉiu miliono da loĝantoj.

Artikolo 3 La agadrimedoj antaŭviditaj de la Asocio estas:

1 - la informado,

2 - la simbolaj agadoj

3 - a) la registrado de la Mondcivitanoj,
    b) la eldonado de la karto de mondcivitano,

4 - la kunvenado de organismoj preparantaj la tutmondajn elektojn por la konstitucianta Asembleo de la Popoloj, kaj, ĝenerale, la stimulado kaj la kunordigado de la diversaj iniciatoj de la mondcivitanoj por atingi la ĉi-supre menciitan celon.

Artikolo 4 La organizado de la Asocio enhavas esence:

1 - informservon,

2 - servon por kunordigi la "simbolajn agadojn",

3 - la Internacian Registrolibron de la Mondcivitanoj, kiu eldonas la karton de mondcivitano,

4 - servon preparantan la tutmondajn elektojn,

5 - komisionojn por prepari tutmonde utilajn servojn.

# *CELE AL LA POLITIKA ORGANIZADO ...*

Kvankam jam de jarmiloj oni povas sin nomi mondcivitano, vere nun, en nia epoko, tiu vorto alprenas sian veran signifon.

Diversaj kialoj estas la origino de tiu ekkonsciado.

Ambaŭ lastaj militoj estis nomataj mondaj, ne internaciaj. Tio gravas, tio simple signifas, ke partoprenis en ili ne nur la nacioj, sed ĉiuj homoj.

La unua mondmilito generis la pacistojn, kiuj ne scipovis eviti la duan mondmiliton, eble pro troaj idealismo kaj fratemo.

La dua mondmilito generis la bombon de Hiroŝimo. Tiam naskiĝis la tutmonda konscio, kaj, kun ĝi, la ideo pri necesa mondcivitaneco.

Mondcivitano ne estas pacisto laŭ la tradicia signifo de la vorto. Li scias, ke la paco estas nepre necesa, por ke la homoj plu vivu kaj plenumu sian destinon, sed necesas scii, ke ne sufiĉas vojaĝi, kunigi junulojn en labortendaroj, organizi kulturajn renkontojn, por ke la paco aperu de si mem. Ĝi povas esti nur la konsekvenco de efika planedskala politika organizado de la homoj.

## ... *MONDSKALA*

"Sed kio estas civitano? Tio estas homo, kiu referencas aŭ apartenas al distinga organizita komunumo, kies leĝoj lin protektas; se ne, li ne estas civitano...

La monda komunumo estas naskota... La Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj, servo por la tutmonda civila stato, estas la unua institucio de formata komunumo, kiu bezonas leĝaron.

Ĉu vi estas esperantistoj, ĉu soldatserv-rifuzantoj, ĉu neperfortuloj, ĉu vi aktivas kontraŭ rasismo, ĉu kontraŭ milito aŭ kontraŭ la atombombo, ne forgesu, ke viaj agadoj kaj manifestacioj en tiuj diversaj sferoj estas nepre necesaj, sed ne sufiĉas. Do, por ke **viaj** agoj fariĝu efikaj, necesas, ke tra ili vi asertu vian volon atingi **mondan leĝon.**

La bombo de Hiroŝimo, ekkonsciigante al ni, ke ĉiuj homoj povas perei en milito, kiu ne plu estus milito, havigis al ĉiu individuo planedan dimension. Ĉiu el ni devas senti sin mobilizata por la monda paco, kiu, tion ni ripetu, estos atingita nur per mondaj leĝoj, arbitraciataj de tutmonda aŭtoritato. La destino de la mondo estas do inter la manoj de ĉiu el ni - kaj, laŭmezure kiel vi kontribuas al la alvenado de tiu monda komunumo, vi plenumas vian taskon de mondcivitano."

Jeanne Haslé, Vallon Pont d'Arc, 1970.

# DEKLARACIO

Konservante siajn apartajn ŝtatanecojn, tiuj, kiuj sin registras kiel "mondcivitanoj",

**agnoskas:**

1. ke al la teknika unuiĝo de la mondo kaj al la kreskanta interdependeco de la ekonomiaj interesoj kaj de la politikaj rivalecoj respondas por ĉiu homo la ekkonscio kaj la prava rajto mondskale esprimi sian respondecon kaj sian suverenecon;
2. ke la suverenaj ŝtatoj, konstitucie limigitaj al la defendado de siaj apartaj interesoj, ne kapablas organizi la defendadon de la bezonoj, kiuj fariĝis komunaj al ĉiuj homoj, kaj eĉ de la pravaj interesoj de la naciecoj;
3. ke la interesoj kaj bezonoj komunaj al ĉiuj homoj devas esti prioritate organizataj kaj defendataj kaj povas efike esti tiaj nur de tutmonda aŭtoritato, kies povo fontas el la popoloj de la mondo.

**deklaras:**

1. ke ili agnoskas ĉiujn homojn kiel siajn tutmondajn kuncivitanojn, kiuj ajn estas iliaj rasoj, iliaj haŭtkoloroj, iliaj politikaj ideologioj, iliaj religioj, iliaj naciecoj;
2. ke ili akceptas sian respondecon de membroj de la tutmonda komunumo, kontribuante per ĉiuj rimedoj, kiujn ili elektas, al la disvolvado de la mondcivitaneco kaj al la starigado de tutmonda leĝaro.

**postulas la rajton:**

1. ricevi legitim-karton de mondcivitano kiel signon de siaj moralaj kaj politikaj sindevontigoj por ĉiuj homoj kaj pruvon, ke ili estas registritaj (kiel estas postulate de voĉdonrajtantoj en multaj landoj) sur la koncernaj listoj de voĉdonrajtantoj;

2. delegi parton de sia suvereneco al tutmonda aŭtoritato kaj rekte elekti siajn reprezentantojn al la tutmonda Asembleo de la Popoloj.

Milionoj da personoj, el ĉiuj mondpartoj, deziras esprimi tiajn konvinkojn. Registrante tiujn gevirojn, unuigante ilin per komuna gesto, la Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj, kiu per sia naturo mem, ne aliĝas al iu flanko en iu el la multaj konfliktoj de la nuna mondo, povas fariĝi simbola kaj efika signo por postuli la organizadon de la monda paco.

La registrado kaj la nombrado de la mondcivitanoj esprimas al la politikistoj kaj al la registaroj la emon de ĉiuj popoloj akcepti - kiel ili antaŭe faris en siaj landoj - ke komuna leĝaro regu en la mondo la problemojn komunajn al ĉiuj homoj, trans tiuj, kiuj dependas de la interesoj de la ŝtatoj.

Ĉiu individuo, kiu sin registrigas kiel mondcivitanon, ne nur kreskigas tiun premon de la opinio al la registaroj, sed li ankaŭ esprimas al ĉiu homo, kiu ajn kaj kie ajn li estu, sian volon dividi kun li la respondecon kaj la rajtojn de komuna civitaneco.

*
* *

# DE LA REGISTRADO AL LA ELEKTO

Ekde sia fondiĝo en 1948, la mondcivitanoj, petante sian enskribon en Internacian Registrolibron por akiri sian mondan legitim-karton, samtempe deklaris, ke "la monda civitaneco ampleksas la rajton voĉdoni por rekta reprezentado al tutmonda Asembleo de la Popoloj".

Konsciante, ke ili ne sukcesus rapide organizi Asembleon per la sistemo de po unu delegito por unu miliono da loĝantoj, la mondcivitanoj realigis peran etapon: la Kongreson de la Popoloj.

La originaleco de la projekto kuŝas en la fakto, ke ĝi ne fontas el la penso de ŝtatistoj aŭ eminentuloj, sed el tiu de civitanoj sen prestiĝo kaj sen gloro, kaj ke ĝi volas esti ilo de la rekta reprezentado de la popoloj.

Al tiuj, kiuj pretas kondamni la balotojn, kiel repreman institucion, ni respondas, ke tiuj, kiujn ni proponas, estas transnaciaj. Tio signifas, ke ili ebligas al civitano de Hindio voĉdoni por usonano, aŭ franco, kaj reciproke; tiel la elektoj efektiviĝas trans la naciaj premoj kaj kondiĉadoj.

Kompreneble, ne temas pri tio, ke la 3 miliardoj kaj duono da teranoj elektu jam de hodiaŭ siajn delegitojn al la Kongreso de la Popoloj.

Tiu sin konsistigas laŭgrade kaj laŭ la ebloj regule organizi la balotadojn. Ni evidente ne kapablas voĉdonigi unufoje centmilojn da individuoj tra la mondo. Sed la Kongreso de la Popoloj alprenos sian definitivan formon, kiam almenaŭ 10 delegitoj ĝin konstituos. Tamen jam de hodiaŭ la elektitaj delegitoj povas publike konigi sian vidpunkton pri internaciaj problemoj, tiel ebligante la konstituiĝon de tutmonda publika opinio.

La monda legitim-karto, nuntempe simbolo de niaj komunaj postuloj kaj ankaŭ karto de elektanto al transnaciaj balotoj, estas rimedo por nin nombri, nu, nia riĉeco kuŝas en la nombro da homoj, kiujn ni reprezentas. Tiu Kongreso de la Popoloj havas la reprezentecon, kiun vi donas al ĝi: laŭ tio, ĉu vi estas pli-malpli multaj, ĝi fariĝos agadgrupo, kiu pli-malpli forte premos al la naciaj registaroj kaj internaciaj instancoj.

*
* *

# KIO ESTAS LA INTERNACIA REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ ?

La Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj estas monda publika servo, kun karaktero strikte teknika.

La Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj estas komisiita havigi rekte, aŭ per reprezentantoj de ĝi regule agnoskitaj, la legitim-karton de mondcivitano al ĉiu persono, kiu ĝin petas subskribinte la **registran deklaron.**

Ĉiu ajn, sen distingo pri nacieco, religio aŭ politika aparteno, rajtas registrigi sin kiel mondcivitanon.

La Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj efektivigas la nombradon de la mondcivitanoj, pere de kaj interkonsente kun la regionaj direktorejoj, cele al la preparado de elektoj al la Konstitucianta Asembleo de la Popoloj.

La Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj ne havas monprofitan celon, ĝi financas sin mem ekskluzive per la laŭvolaj kontribuoj, kiuj povas akompani la havigon de la mondaj legitim-kartoj.

La monda legitim-karto estas identa por ĉiuj popoloj. Ĝi atestas, ke la havanto sin konsideras membro de la organizenda monda komunumo, ke li deziras partopreni en balotoj por reprezentado al iu Konstitucianta Asembleo de la Popoloj.

Simbolo de la ekkonscio pri historia evoluo, la karto de mondcivitano, akirita por la vivo, neniukaze povas esti konsiderata kiel la esprimo de politika elekto.

La Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj estas la **SOLA** organismo en la mondo, kiu eldonas kartojn de mondcivitanoj en la ĉefaj lingvoj. Ĝi akreditas centrojn en la diversaj landoj de la mondo, al kiuj ĝi havigas kartojn, kaj nombras, en la tuta mondo, la mondcivitanojn, kiuj sin registrigis.

**Noto:** La karto de mondcivitano ne estas karto de aliĝinto al iu movado. Ĝi estas donata unufoje por ĉiam, kaj ne povas esti anstataŭata, krom en kazo de perdo aŭ eluziĝo.

Ĉiu persono rajtas posedi nur unu karton.

# LEGITIM-KARTO

№ 102368

世界公民

विश्व-नागरिक

WORLD CITIZEN

ГРАЖДАНИН МИРА

MONDCIVITANO

Mondcivitaneco entenas la rajton baloti por senpera reprezentado ĉe Tutmonda Asembleo de la Popoloj.

## IDENTECO

| | |
|---|---|
| Nomo | |
| Antaŭnomoj | |
| Naskiĝinta la | |
| En | |

## ADRESO

| | |
|---|---|
| Strato | |
| Loko | |
| Lando | |

| | |
|---|---|
| Fotografaĵo | Stampo |

**Tiu karto atestas, ke la koncernato estas registrita kiel Mondcivitano. Li strebos agnoski siajn respondecojn kiel membro de la Tutmonda Komunumo.**

Subskribo de la koncernato